Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 3-a de Junio 2019

Ĉeestantoj: Amri Wandel, Jehoŝua Tilleman, Mikaelo Lineckij, Ŝlomo Ŝaĥar, Dror Gaon, Matilda Landaŭ, Eran Vodevoz, Gabi Zeevi. Gasto: Amos Ŝapira.

Protokoloj de du pasintaj kunsidoj estas en la retejo (notu la ĝisdatigojn en krampoj [ ])
http://esperanto.org.il/dosieroj/ELIEP201904.pdf
http://esperanto.org.il/dosieroj/ELIEP201905.pdf

1. Sciigoj

a) Tutpaĝa artikolo pri la IK kaj la postkongresoj aperis en la junia n-ro de Esperanto
b) Ne okazis la maja jerusalema kunveno pro manko de partoprenantoj. Al la leciono venis neniu lernanto.
c) Salutanto en Lahti: Kandidatoj estas Jael Ŝelaĥ, Jehuda Miklaf kaj lia edzino, Maurin. (Jael jam salutis en 2014). *Voĉdono: J. Miklaf – (unuanime).*

2. Landa Kunveno (Jehoŝua, Amri, Matilda)

a) Ĉu en la granda salono, aŭ en la klubejo? Dato: 17/6 (lundo – en la klubejo) aŭ 18/6 (mardo – en la salono)
I. Amri proponis ĉi-jare okazigi la LK-n en la klubejo anstataŭ en la halo, kaj tiel ŝpari 890 siklojn pro la malbona financa situacio (vidu 3 sube: la nepaganta luanto!)
II. En la lastaj jaroj ĉiam estis ĉ. 30 partoprenantoj kaj en la LK kaj en ZV (sume de la tuta vespero, plejparte de la tempo estis nur 20-25).
III. Miĥal kaj Eldad, la du klubgvidantoj subtenas.
b) Jehoŝua petas diskuti pri tio: Ni devas admoni ĉiujn por partopreni, pasinte estis ankaŭ telefonoj al la membroj. Ne estas sufiĉa loko por la babilado, la programo - kaj por la kaso kune, tro dense. Aliaj: ne estas tie piano. Oni ne povos eniri antaŭ 18:30. Ni jam antaŭmendis la salonon ĉe S-ro Efrati – kvankam oni povas nuligi sen punpago. Aliflanke: Doron sciigis, ke ne venos marde pro la tro malfrua ŝanĝo de la tago (por la salono).
c) *Voĉdono: por la klubejo 5, por la salono 1, sindetenas 2. - Decidite!*
ĉ) Arta programo: Matilda komencis noti la programerojn. Ŝi devos telefoni por kelkaj respondoj. Grave: ni devas elekti prezidanton, kiu gvidos la oficialajn programerojn, prefereble antaŭ la paŭzo. Matilda devos kunagadi kun li/ŝi.

3. Dratverejo (Jehoŝua, Amri, Ŝlomo kaj Amos)

a) La luanto pagis al Amos 4000 NIS en aprilo.
b) Jehoŝua sukcesis paroli kun li en majo, post kiam Amos algluis nian leteron sur la pordon. Li promesis pagi pli. Jehoŝua: ne estis iu posta kontakto?
c) Ne sukcesis la provoj malkonekti la elektron kaj la akvon. La instancoj ne akceptas nian peton (kiel posedantoj), nek la peton de la antaŭa luanto (sur kies nomo estas la elektro nun) – ili volas ke la luanto mem venu el ili – tion li certe ne faros.

2/...

ĉ) Lau la antaŭaj decidoj ni provu evakui la luanton per la ekzekuta instanco (הוצאה לפועל).
d) Amri parolis kun adv.Modan pri la detaloj. Estas bezonataj:
1) deklaroj de Amos kaj de ELI – kiam li algluis la leteron al la pordo, atesto de subskribo;
2) la ĉeko kiu revenis (Ŝlomo jam akiris ĝin de la banko);
3) interkonsento pri pago al la advokato (שכ"ט עו"ד). La minimuma kosto estas 10,000 NIS.
e) Se ELI ne volas elspezi tiun sumegon, estas du eblecoj:
1) Por evakuado (צו פינוי) necesas turni al la kortumo, kun la bezonataj dokumentoj;
2) Por devigi lin pagi la ĉekojn, sufiĉas turni kun la reveninta ĉeko al la ekzekutistoj (הוצאה לפועל). Se ni agos mem, adv. Ram Modan konfirmos la deklaron senpage. Amos kaj Amri iros al li por konfirmo de iliaj subskriboj sur la du bezonataj deklaroj.
f) Ŝlomo estis nomita (en la antaŭa kunsido) respondeculo pri la apartamento, li pretas trakti la aferon, iri al la banko, al la ekzekutistoj, ktp. Ni devos pagi 150 siklojn kaj deponi la revenintajn ĉekojn (estos jam du, ankaŭ la deponita sekur-ĉeko).
g) Eran: Oni povas kontroli en la reto, per identec-numero kaj pago de 11 NIS, ĉu la loĝanto (kaj la venontaj loĝantoj) havas aŭ ne havas ŝuldojn al רשם המשכונות. Por la estonteco!

4. <u>UEA kotizŝanĝo</u> (Amri, Jehoŝua)

a) Sekve de retmesaĝo de Amri Martin (ĜD de UEA) preciziĝis, ke ĉiu membro de ELI kiu tion petos kaj Jehoŝua (la Ĉefdelegito) rekomendos, povos membriĝi kiel IM de UEA en la 4-a kategorio (27 anstataŭ 44 eŭroj).
b) Jehoŝua komunikis pri tio kun Martin kaj kontaktis potencialajn membrojn. Ĝis nun estas 4 homoj kiuj pretas aliĝhi al UEA laŭ tiu oferto. (Post rekalkulo estis trovitaj 8)
c) Tiuj kiuj jam pagis al Jehoŝua laŭ la pli alta tarifo, rajtas peti rericevi la diferencon.
ĉ) Necesas ANTAŬ la LK reklami tiun oferton de UEA, kaj dum la LK active varbi kaj kolekti kotizojn por ELI kaj por ELI+UEA!
d) Jehoŝua devas pasigi jam la kotizojn kun la listo de la pagintoj al UEA. Plendo: pro severiĝo de la personaj rajtoj en la Eŭropa Komunumo UEA ne volas liveri al Jehoŝua la aktualan adresojn de la israelaj delegitoj, kiun liston Jehoŝua mem liveris iam al UEA! Eble ni devus peti la konsenton de niaj membroj por tio.
e) Jehoŝua povas rekonstrui tiujn datumojn de siaj dosieroj. Li promesis sendi al Ŝlomo kaj aliaj funkciuloj la liston de la membroj kun la datumoj.

5. <u>Financoj</u> (Ŝlomo)

a) La registristo ne kontentas pri nia respondo pri la pago de vojaĝelspezoj, petas aldonajn detalojn.
b) Raporto de Ŝlomo pri la financa situacio al la Estraro kaj al la LK – estos kaj buŝe, kaj per disdono de printita paĝo.
c) Propono: estonte la pago al la kursinstruisto estu surbaze de la enspezoj de la kurskotizoj
Voĉdono: unuanime aprobita!
d) Pro la UEA-membreco Jehoŝua apenaŭ kolektas membrokotizojn. Ŝlomo pretas enkasigi la membrokotizojn, kiel praktike tion fari? (poŝte, telefone, dum la LK ?) **3/...**

5. Israela E-isto (Mikaelo, Amri)

a) IE167 ankoraŭ ne estas enretigita, kvankam Mikaelo jam sendis ĝin al Dror, ĉar ĝi estis en maltaŭga formo. Amri petos de la presejo la finan PDF-version, kiel li faris por IE166.
b) Amri sendis al Mikaelo la listojn de s-anoj kiuj ricevis IE-166 kaj 167 mane en la ZV kaj IK. Mikaelo: restis 60 ekz. de IE166 – estas bezonataj ankoraŭ 31, restis 35 ekz. de IE 167 – estas bezonataj ankoraŭ 59 – por ke mi povu fari 91 duoblajn sendaĵojn. Krome estas 33 organizaĵoj kaj 59 eksterlandaj adresoj. Amri: mi alportos ankoraŭ 30 ekz. el 166, kaj ni devos represi 60-70 ekz. el 167. Mikaelo ankoraŭ *ne* dissendis la kovertojn.
c) Amri sendis al Mikaelo instrukciojn pri poŝta amasa rabatita sendado eksterlanden, kaj la retligon de la koncerna poŝta retpaĝo, por montri en la poŝtoficejo.

6. IK 21 (Amri)

Proponoj por 2020: TA (Bnei Dan), Jerusalemo (Agron), aŭ Petaĥ Tikva (en tiea junulara *Voĉdono: por Dan-bloko (unuanime).* Ĉu TA aŭ PT – decidinda poste, post esploro de Nava.

7. Oficejo (Amri)

a) WE kaj Recital verŝajne ne estas jam aktualaj por ni. Ŝlomo serĉas aliajn eblecojn.
b) Adv. Modan kaj Ŝlomo daŭre pledas konsideri la oficejon en Bnei Brak (ĉe la trajno, “nur” 15,000 por kvadratmetro, uzo de kunvenejo – kiom granda?).
c) Ŝlomo raportis retpoŝte pri kelkaj novaj eblecoj. Kelkaj ne taŭgaj, aliaj esplorendaj.

8. Jerusalema Libro-Foiro (Amri)

En la oficiala retejo daŭre estas nur lakona sciigo, ke pli aktualaj informoj aperos. Supozeble ĉi-jare ĝi ne okazos.

La venonta kunsido: 1-a de Julio 2019, 19:30

Protokolis: Gabi Zeevi